

Ĉu Vi Parolas Esperante?

你讲世界语吗？

Andrzej Pettyn

Duve 汉译

国柱、彭争鸣 校对

eLibrigita de Elerno

feb. 2009

LA UNUA LECIONO

Bonan tagon!

- Bonan tagon!
- Bonan tagon!
- Mi estas Karlo Lasota.
- Pardonu, kiu vi estas?
- Mi estas Karlo Lasota.
- Karlo Lasota? Tre agrable. Mi estas Eŭgeno Guzek.
- Tre agrable.
- Ĉu Georgo estas hejme?
- Jes, li estas hejme.
- Kaj ĉu Teresa ankaŭ estas hejme?
- Teresa? Ŝi estas en teatro.

Ĉu vi nun estas libera?

- Bonan vesperon, Georgo!
- Bonan vesperon, Karlo!
- Ĉu vi nun estas libera?
- Jes, mi nun estas libera.
- Bone. Jen estas fotoalbumo.
- Fotoalbumo?
- Jes! Ĝi estas mia familia fotoalbumo.
- Ho... jes... Ĝi estas tre interesa.

LA DUA LECIONO

Familia fotoalbumo

- Jen estas mia patro kaj jen estas mia patrino.
- Kio estas via patro?
- Mia patro estas instruisto.
- Kaj kio estas via patrino?
- Mia Patrino? Ŝi estas instruistino.
- Kiu li estas?
- Li? Li estas mia frato. Mia frato estas studento.
- Ĉu ŝi estas via fratino?
- Jes, sinjoro.

第一课

你好!

- 你好!
- 你好!
- 我是卡尔·罗索塔。
- 对不起你是谁?
- 我是卡尔·罗索塔。
- 卡尔·罗索塔? 非常高兴。我是艾乌克罗·古斯克。
- 非常高兴。
- 戈尔科在家吗?
- 是的, 他在家。
- 那麽德尔莎也在家吗?
- 德尔莎? 她看戏去了。

你现在有空吗?

- 晚上好, 戈尔科!
- 晚上好, 卡尔!
- 你现在有空吗?
- 是的, 我有空。
- 好的, 瞧, 这是一本相册。
- 是相册吗?
- 是的, 它是我们家的相册。
- 喔, 是的, 它非常有趣。

第二课

家庭相册

- 瞧, 这是我的父亲, 这是我的母亲。
- 你父亲是干什么的?
- 我父亲是老师。
- 那麽你母亲是干什么的?
- 我母亲吗? 她也是老师。
- 这个人是谁?
- 他? 他是我的哥哥, 我哥哥是大学生。
- 那麽她是你的姐姐吗?
- 是的, 先生。

- Kaj kio ŝi estas?
- Ŝi estas studentino.
- Ĉu ŝi estas diligenta studentino?
- Jes. ŝi estas diligenta studentino.

Kia vi estas?

- Kia estas via onklo?
- Mia onklo estas tre simpatia kaj energia viro.
- Kaj kia estas via onklino?
- Mia onklino estas sentimentala kaj samtempe sentema virino.
- Kaj kia estas via koleginino?
- Ŝi estas alta kaj svelta. Mia koleginino estas gaja kaj samtempe sentema fraŭlino.
- Ĉu ŝi estas flegma?
- Ne, ŝi ne estas flegma, sed energia.
- Kaj kia estas via kuzo?
- Mia kuzo? Li estas moderna junulo.
- Ĉu via kuzino Irena ankaŭ estas moderna junulino?
- Ne, ŝi ne estas moderna junulino.

- 她是干什么的?
- 她是大学生。
- 她是一个勤奋的学生吗?
- 是的, 她是个勤奋的学生。

你是什么样的人?

- 你叔叔是个什么样的人?
- 我叔叔是个有同情心又身强力壮的男人。
- 那么你阿姨是个什么样的人?
- 我阿姨是个多情善感同时又很敏感的女人。
- 你的女同事是个什么样的人?
- 她很高而且很苗条, 我的女同事是个快活而又敏感的少女。
- 她是否有点冷漠?
- 不, 她不冷漠, 但很有能力。
- 你表兄是个什么样的人?
- 我表兄吗? 他是个现代化的青年。
- 那么你表妹依尔娜也是个现代化女青年吗?
- 不, 她不是个现代化的女青年。

LA TRIA LECIONO

Kiel vi fartas, sinjorino?

- Bonan tagon, sinjorino!
- Bonan tagon, sinjoro!
- Kiel vi fartas?
- Dankon, bone. Kaj kiel vi fartas. sinjoro?
- Donkon, tute bone.
- He, sinjorino...
- Ĝis revido! Mi estas tre okupita!
- Okupita?
- Jes, Mi rapidas al Esperanto-kurso.
- Ĝis revido!
- Ĝis revido!

Leciono

- Ĉu vi estas studento?
- Jes, mi estas studento.
- Kie vi studas?

第三课

太太, 身体好吗?

- 你好, 太太!
- 你好, 先生!
- 你身体好吗?
- 谢谢, 很好。你身体好吗? 先生。
- 谢谢, 非常好。
- 喂, 太太... ...
- 再见! 我很忙!
- 很忙?
- 是的, 我要赶快到世界语讲习班上课;
- 再见!
- 再见!

上课

- 你是大学生吗?
- 是的, 我是大学生。
- 你在哪儿上学?

- Mi studas en universitato.
- Ĉu vi studas, sinjoro?
- Ne, mi ne studas. Mi laboras. Mi estas laboristo.
- Kie vi laboras?
- Mi laboras en fabriko. Mi laboras en la fabriko "Wedel".
- Sinjorino, ĉu vi studas aŭ laboras?
- Mi laboras.
- Ĉu vi laboras en Varsovio?
- Jes, mi laboras en Varsovio. Mi laboras en oficejo. Mi estas oficistino en la oficejo "Ars Polona".
- Kaj kio vi estas?
- Mi estas lernanto.
- Kie vi lernas?
- Mi lernas en lernejo. Mi lernas en la lernejo "Zamenhof".

- 我在大学上学。
- 先生，你也上学吗？
- 不，我不上学，我在工作，我是个工人。
- 你在哪儿工作？
- 我在工厂工作，我在维德尔工厂上班。
- 太太，你是上学还是上班？
- 我上班。
- 你在华沙上班吗？
- 是的，我在华沙上班，在办公室工作，我是波兰阿尔斯办公室的职员。
- 你是干什么的？
- 我是学生。
- 你在哪儿上学？
- 我上小学，我在柴门霍夫小学上学。

LA KVARA LEClONO

Post la leclono de Esperanto

- Instruisto: Ĉu vi intencas korespondi en Esperanto?
- Sinjoro Marko: Jes, mi intencas.
- I: Kaj vi, sinjorino?
- Barbara: Jes, mi ankaŭ intencas korespondi en Esperanto.
- I: Jen estas adreso de bulgaro, kaj jen estas adreso de hungaro.
- B: Mi dankas, sinjoro!
- I: Ĉu vi volus korespondi kun bulgaroj kaj hungaroj?
- B: Jes, mi volus. Mi volus korespondi kun bulgaroj. Ili estas tre gajaj, tre simpatiaj viroj.
- M: Kaj mi volus korespondi kun hungarinoj. Ili estas tre sentemaj, tre interesaj virinoj.

Mi povas helpi al vi

- Barbara: Do, vi volus korespondi kun hungarinoj?

第四课

世界语课后

- 老师：你打算用世界语通信吗？
- 马尔科先生：是的，我打算用世界语通信。
- 老：太太，你呢？
- 芭芭拉：是的，我也打算用世界语通信。
- 老：这是一个保加利亚人的地址，而这是一个匈牙利人的地址。
- 芭：谢谢你，老师！
- 老：你愿意同保加利亚和匈牙利男人通信吗？
- 芭：是的，我愿意。我愿意同保加利亚和匈牙利人通信。他们是快乐和富有同情心的人。
- 马：而我愿意同匈牙利女人通信，她们是一些非常敏感而有趣的女人。

我可以帮助你

- 芭芭拉：这么说，你想和匈牙利女人通信咯？

- Marko: Jes, ĝuste.
 - B: Mi povas helpi al vi, sinjoro.
 - M: Vi povas helpi al mi? Ĉu vere?
 - B: Jes, vere. Vidu, mia edzo korespondas kun kelkaj hungaroj kaj hungarinoj.
 - M: Kaj?
 - B: Jen estas koverto. Sur la koverto estas adreso de unu hungarino. Ŝi estas fraŭlino Eva Kovacs.
 - M: En kiu urbo ŝi loĝas?
 - B: Ŝi loĝas en Budapeŝto.
 - M: Mi ne scias, ĉu ŝi volus korespondi kun mi.
 - B: Vi povas skribi al ŝi kaj demandi.
 - M: Jes, vere. Mi devas skribi al fraŭlino Eva kaj demandi, ĉu ŝi volus Korespondi kun mi. Mi dankas al vi, sinjorino Barbara!
 - B: Ne dankinde!

- 马尔科: 是的, 正是。
 - 芭: 我可以帮助你, 先生。
 - 马: 你可以帮助我? 真的吗?
 - 芭: 是的, 是真的。我的丈夫正和几个匈牙利男女通信。
 - 马: 怎么样?
 - 芭: 这是个信封, 上面有一个匈牙利女人的地址。她就是爱娃·科瓦奇小姐。
 - 马: 她住在哪个城市?
 - 芭: 她住在布达佩斯。
 - 马: 我不知道她是否愿意和我通信。
 - 芭: 你可以写封信问她一下。
 - 马: 真的, 我应该写封信给爱娃·科瓦奇, 问她是否愿意和我通信。谢谢你芭芭拉太太。
 - 芭: 不用谢!

LA KVINA LECIONO

Sur la strato Nowy Świat

- Marko: Ĉu mi povas akompani al vi, sinjorino?
 - Barbara: Jes, sed...
 - M: ..., mi tre ĝojas, ke mi povas iri kun vi, kie vi loĝas, sinjorino?
 - B: Tio ĉi estas nediskreta demando.
 - M: Ne estas nediskretaj demandoj, estas nur nediskretaj respondoj.
 - B: Hm, vi pravas. Vi estas tre sprita, sinjoro. Mi loĝas ĉe la strato "Micklewicz".
 - M: En kiu kvartalo ĝi troviĝas?
 - B: Ĝi troviĝas en la kvartalo Żoliborz. Kaj, ĉe kiu strato vi loĝas, sinjoro?
 - M: Mi loĝas ĉe la strato "Sienkiewicz", en la centro de la urbo.
 - B: Do, vi loĝas apud la Filharmonio, ĉu?
 - M: Jes, sinjorino.
 - B: Mi tre ofte estas en la Filharmonio.
 - M: Ĉu kun la edzo?
 - B: Ne. Mia edzo ne interesiĝas pri muziko.

第五课

在诺维斯维瓦特大街上

- 马尔科: 我可以陪你走一下吗? 太太。
 - 芭芭拉: 当然, 但是...
 - 马: ..., 我非常高兴陪你散步, 请问太太, 你住在什么地方?
 - 芭: 这是个不恰当的问题。
 - 马: 不是不恰当的问题, 而只是不恰当的回答。
 - 芭: 哼, 你说得对。先生, 你很机灵。我住在米克留维奇大街。
 - 马: 它在哪个区?
 - 芭: 它在罗尼布司区。那么请问先生, 你住在哪条大街?
 - 马: 我住在市中心圣克维兹大街。
 - 芭: 那么, 你是住在音乐大厅旁, 对吗?
 - 马: 是的, 太太。
 - 芭: 我经常去音乐大厅。
 - 马: 是和丈夫一起去吗?
 - 芭: 不, 我丈夫对音乐不感兴趣。他只对世

Li interesiĝas nur pri Esperanto.

- M: Do via edzo estas esperantisto?

- B: Jes. Li ne interesiĝas pri muziko, li ne interesiĝas pri mi, li interesiĝas nur pri Esperanto. Esperanto estas lia granda hobbio.

Antaŭ la kafejo “Aida”

- Marko: Ĉu vi ŝatas kafon, sinjorino?

- Barbara: Kafon?, Jes, mi ŝatas kafon. Sed kial vi demandas pri tio?

- M: Ĉar mi ĝuste staras antaŭ kafejo. ĉu mi povas proponi al vi kafon?

- B: Tre volonte, sed...

- M: Mi volus iom paroli kun vi, sinjorino. Ho, mi vidas, ke estas libera loko.

En la kafejo “Aida”

- Marko: Jen estas seĝo por vi, sinjorino!

- Barbara: Dankon!

- M: Vi deziras kafon, ĉu?

- B: Jes, mi deziras kafon.

- M: Ĉu vi deziras grandan kafon?

- B: Ne. Mi deziras malgrandan kafon.

- M: Kaj kukon, Jes?

- B: Jes, mi petas kukon. Mi petas tortan kukon.

- M: Sinjorino!

- Kelnerino: Jes?

- M: Ni deziras unu malgrandan kafon, unu teon kaj du tortajn kukojn.

LA SESA LEKIONO

Interparolo

- Barbara: Do vi volus iom paroli kun mi, ĉu?

- Marko: Hmm... Jes, sinjorino!

- B: Pri kio vi volus paroli kun mi?

- M: Pri vi, sinjorino!

- B: Pri mi?

- M: Jes, pri vi! Mi volus demandi vin...

界语感兴趣。

- 马: 那麼, 你丈夫是个世界语者吗?

- 芭: 是的, 他对音乐不感兴趣, 对我也不感兴趣。他只对世界语感兴趣, 世界语是他最大的嗜好。

在“阿依达”咖啡店前

- 马: 太太, 你喜欢喝咖啡吗?

- 芭: 咖啡? 是的, 我喜欢喝咖啡。但是你问这个问题干甚麽?

- 马: 因为我们正好站在咖啡店门前。我可以请你喝一杯咖啡吗?

- 芭: 非常愿意, 但是...

- 马: 我想和你说会儿话, 太太。哦, 我看见里面有空位置。

在“阿依达”咖啡店里

- 马: 太太, 请坐在这里!

- 芭: 谢谢!

- 马: 你想喝杯咖啡, 是吗?

- 芭: 是的, 我想喝杯咖啡。

- 马: 是一大杯咖啡吗?

- 芭: 不, 我想要一小杯咖啡。

- 马: 要点点心吗?

- 芭: 是的, 我要点点心。我要个蛋糕。

- 马: 服务员!

- 服务员: 要点什么?

- 马: 我们要一小杯咖啡, 一杯茶和二个蛋糕。

第六课

交谈

- 芭芭拉: 你有话要对我说, 是吗?

- 马尔科: 唔... 是的, 太太。

- 芭: 你想同我说甚麽?

- 马: 说你, 太太!

- 芭: 说我?

- 马: 是的, 说你! 我想问你...

- B: ... bonvolu!
 - M: Mi volus demandi vin... do vi ŝatas muzikon, jes?
 - B: Jes, mi ŝatas.
 - M: Ĉu vi ŝatas teatron kaj kinon?
 - B: Jes, mi ŝatas.
 - M: Kiu komponisto precipe plaĉas al vi?
 - B: Penderecki.
 - M: Kaj kiu aktoro precipe plaĉas al vi?
 - B: Gustaw Holoubek. Li estas modelo de bona aktoro, Sentimentala, eleganta, belaspekta.
 - M: Do, laŭ via opinio, tia devus esti modela viro?
 - B: Laŭ mia opinio, modela viro devus, esti kuraĝa, diskreta, eleganta, kaj sentimentala!
 - M: Kaj kio estas via devizo?
 - B: Mi deziras esti eleganta por mi kaj simpatia por ĉiuj.
 - M: Kio estas via granda revo?
 - B: Mi ne scias. Kaj kio estas via granda revo, sinjoro?
 - M: Mi volus forverturi al Parizo, Londono, Moskvo, Romo. Mi volus fariĝi kosmonaŭto kaj atingi la lunon.

Mi estas nekuraĝa

- Barbara: Via fantazio, sinjoro, estas tre granda.
 - Marko: Ĉu, laŭ via opinio, tio ĉi estas avantaĝo aŭ malavantaĝo?
 - B: Malavantaĝo.
 - M: Estas ankoraŭ unu malavantaĝo - mi estas nekuraĝa.
 - B: Nekuraĝa?
 - M: Jes. Mi volus demandi vin, pri... sed...
 - B: Mi estas tre scivola.
 - M: Kion vi intencas fari morgaŭ posttagmeze?
 - B: Mi intencas legi libron.
 - M: Kaj kion vi intencas fari morgaŭ vespere?
 - B: Mi intencas rigardi televidon. Sed kiucele vi demandas min pri tio?
 - M: Mi volus renkontiĝi kun vi, sinjorino!

- 芭: ... 请问吧!
 - 马: 我想问你... 你喜欢音乐, 是吗?
 - 芭: 是的, 我喜欢。
 - 马: 你喜欢看戏剧和电影吗?
 - 芭: 是的, 我喜欢。
 - 马: 你最喜欢哪位作曲家?
 - 芭: 潘得列斯基。
 - 马: 你最喜欢哪位演员?
 - 芭: 古斯塔·霍留别克。他是个最好的演员, 多情、有毅力外表又漂亮。
 - 马: 这么说, 根据你的看法, 这样的人应该是个标准的男人吗?
 - 芭: 按我的观点, 标准的男人应该是勇敢、温柔、优雅并且感情丰富。
 - 马: 那么, 你的格言是甚麽?
 - 芭: 我愿意做到对自己有教养, 对别人有同情心。
 - 马: 你最大的梦想是甚麽?
 - 芭: 不知道。那么, 先生, 你最大的梦想又是甚麽?
 - 马: 我想到巴黎、伦敦、莫斯科、罗马去旅行。我想成为一名宇航员, 并飞往月球。

我很胆小

- 芭芭拉: 先生, 你的幻想也太大了。
 - 马尔科: 那么, 依你看, 这是优点还是缺点?
 - 芭: 缺点。
 - 马: 我还有一个缺点, 那就是——我很胆小。
 - 芭: 胆小?
 - 马: 是的, 我想问你... 关于... 但是.....
 - 芭: 我很想知道。
 - 马: 明天下午你打算干甚麽?
 - 芭: 我准备看书。
 - 马: 那晚上你准备干甚麽?
 - 芭: 我准备看电视。然而你问这个问题是甚麽目的?
 - 马: 太太, 我想和你约会。

- B: Morgaŭ mi ne povas...
- M: ... do eble postmorgaŭ? Bone?
- B: Bone, sed kie?
- M: Eble ĉi tie, en la kafejo?
- B: Bone.

- 芭: 明天是不可能的...
- 马: ... 那麽, 后天可以吗?
- 芭: 可以, 但在甚麽地方?
- 马: 要不就在这儿, 在咖啡店怎麽样?
- 芭: 好吧。

LA SEPA LEClONO

Ĉiam ĵaluza

Vespere Barbara estas en ŝia hejmo kaj interparolas kun sia edzo, Petro

- Barbara: Bonan vespron!
- Petro: Bonan vesperon!
- B: Kion vi faras, mia kara?
- P: Mi ĝuste skribas leteron al mia Hungara korespondanto.
- B: Korespondanto aŭ korespondantino?
- P: Denove la samo, ĉiam ĵaluza!
- B: Ĵaluza, ĵaluza! Por vi ekzistas nur Esperanto kaj viaj korespondantoj.
- P: Mia kara, sed ja vi ankaŭ interesiĝas pri Esperanto. Vi ja iris al la kurso de Esperanto.
- B: Mi interesiĝas. Ha, mi interesiĝas pri Esperanto. Mi interesiĝas, ĉar mi devas.
- P: Vi tute ne devas! Ja vi mem decidis lerni Esperanto.
- B: Jes, jes...
- P: Estas jam malfrue, kion vi faris post la leciono?
- B: Mia kara edzo deziras scii, kion mi faris post la leciono? Bone. En la kurso de Esperanto estas multaj interesaj viroj kaj...
- P: Kaj?
- B: Precipe unu. Li proponis al mi kafon.
- P: Kaj vi iris kun li al kafejo?
- B: Jes, mi iris kun li al kafejo. Estis tre agrable.
- P: Vi estas eksterordinare sincera.
- B: Jes, mi estas eksterordinare sincera.

第七课

老是吃醋

晚上芭芭拉在家和丈夫彼得交谈。

- 芭芭拉: 晚上好 !
- 彼得: 晚上好!
- 芭: 亲爱的, 晚上你干甚麽?
- 彼: 我正准备给匈牙利信友回信。
- 芭: 是男信友还是女信友?
- 彼: 又是老一套, 总是吃醋。
- 芭: 吃醋, 吃醋! 对你来说, 就只有世界语和世界语信友。
- 彼: 我亲爱的, 你不是对世界语也很感兴趣吗? 你不是也到世界语讲习班去上课吗?
- 芭: 我是感兴趣。哈! 我对世界语感兴趣。因为我必须这样。
- 彼: 你完全没有必要! 是你自己决定学习世界语的。
- 芭: 是的, 是的...
- 彼: 已经不早了, 下课后你干甚麽?
- 芭: 我亲爱的丈夫想知道, 下课后我干甚麽吗? 好吧, 告诉你, 在世界语讲习班有很多有趣的男人, 而且.....
- 彼: 怎麽样?
- 芭: 特别有一个人, 他请我去喝咖啡。
- 彼: 那麽你就和他一起去咖啡店了?
- 芭: 是的, 我和他一起去咖啡店了。我感到特别愉快。
- 彼: 你倒是格外的热情。
- 芭: 是的, 我是格外的热情。

Ĉiam malica

- Barbara: Kion vi deziras manĝi, mia kara?
- Petro: Ĉu vi havas fromaĝon?
- B: Jes, mi havas.
- P: Kaj ĉu vi havas ŝinkon?
- B: Jes, mi havas.
- P: Do mi petas panon kun fromaĝo kaj buterpanon kun ŝinko. Aĥa ĉu vi havas ovojn?
- B: Bedaŭrinde mi ne havas ovojn.
- P: Sed ja hieraŭ posttagmeze vi aĉetis ovojn?
- B: Jes, sed hodiaŭ matene vi manĝis ilin. Ĉu vi deziras trinki kafon aŭ teon?
- P: Mi petas teon, Mi petas teon kun citrono.
- B: Mia edzo estas mia sinjoro. Por mia kara edzo mi estas preta fari ĉion.
- P: Ĉiam malica.
- B: Sed sincera.

总是开玩笑

- 芭芭拉：亲爱的，你想吃点甚麽？
- 彼得：有奶酪吗？
- 芭：是的，有。
- 彼：那么我们有火腿吗？
- 芭：是的，有。
- 彼：那么我要一个奶酪面包和一个火腿奶油面包。啊，我们还有鸡蛋吗？
- 芭：可惜没有鸡蛋了。
- 彼：可是昨天下午你不是买了鸡蛋吗？
- 芭：是买了，但是今天早上你把它们吃光了。你想喝点咖啡还是喝点茶？
- 彼：喝茶，我要一杯柠檬茶。
- 芭：我的丈夫就是我的先生。为了我亲爱的丈夫，我准备牺牲一切。
- 彼：总是开玩笑。
- 芭：但是是诚心的。

LA OKA LECIONO

Iru kun mi al kinejo

Barbara interparolas kun ŝia edzo. Ŝi proponas iri al kinejo.

- Barbara: Iru kun mi al kinejo.
- Petro: Mi ne povas.
- B: Vi ne povas? Kial?
- P: Komprenu, mi ricevis leteron de mia hungara korespondantino...
- B: Tamen korespondantino!
- P: Jes, korespondantino. Mi ankaŭ estas sincera.
- B: Kaj vi devas respondi al ŝi, ĉu? Por ŝi vi havas tempon!
- P: Ne koleru, mia kara, sed...
- B: Por viaj geamikoj, por viaj gekorespondantoj vi ĉiam havas tempon, sed ne por mi!
- P: Vi troigas, mia kara! Ja mi ĉiam havas tempon por vi, sed...
- B: ... sed, sed...
- P: Ja ni estas bonaj geedzoj!

第八课

和我一起看电影去吧

芭芭拉在和自己的丈夫说话。她提议一起去看电影。

- 芭芭拉：和我一起看电影去吧。
- 彼得：我不能去。
- 芭：你不能去？为甚麽？
- 彼：请你理解，我收到了一封匈牙利女信友的来信... ..
- 芭：又是女信友！
- 彼：是的，是女信友。我也是非常诚实的。
- 芭：那么你必须给她回信，是吗？对她你就有时间！
- 彼：请别生气，亲爱的！但是.....
- 芭：为了你的男女朋友和信友们，你总是有时间，但却不是为了我。
- 彼：你太过分了，亲爱的！为了你我永远有时间，但是.....
- 芭：.....但是，但是.....
- 彼：我们是名副其实的一对好夫妻！

- B: Bonaj geedzoj? Ni estas bonaj geedzoj por niaj gefratoj, por viaj geonkloj...
- P: Aŭskultu! Al kinejo ni povas iri morgaŭ aŭ postmorgaŭ. Hodiaŭ mi devas resti hejme kaj respondi al mia korespondantino, ĉar -- komprenu -- ŝi deziras veni al Pollando, kaj mi promesis informi ŝin pri prezoj kaj tiel plu (ktp.).
- B: Nun mi komprenas. Kial vi tuj ne diris al mi, pri kio temas?
- P: Mi volis diri al vi, sed vi ne allasis min paroli.

Telefona interparolo

- Danuta: Halo! Ĉu estas vi. Barbara?
- Barbara: Jes, estas mi.
- D: Bonan tagon! Parolas Danuta.
- B: Bonan tagon mia kara!
- D: Aŭskultu Barbara Kion vi intencas fari hodiaŭ vespere?
- B: Mi intencas aŭskulti radion kaj legi gazetojn.
- D: Kaj kion intencas fari hodiaŭ vespere via edzo?
- B: Kiel kutime li intencas okupiĝi pri Esperanto. Sed diru, kial vi demandas pri tio?
- D: Ĉu vi povas veni al mi?
- B: Al vi? Hodiaŭ vespere?
- D: Jes, Vi scias, ke mi ricevis novan kooperativan loĝejon.
- B: Jes. mi scias.
- D: Do, ĝuste hodiaŭ vespere mi deziras montri al vi mian novan loĝejon. Venu al mi kun via edzo!
- B: Mia edzo estas tre okupita...
- D: ... vespere ankaŭ?
- B: Mi pensas, ke jes.
- D: Do venu sola, sen via edzo!
- B: Bone.
- D: Do ĝis la revido vespere?
- B: Jes, ĝis la revido vespere!

- 芭: 好夫妻? 对我们的兄弟姐妹和你的叔叔阿姨们来说, 我们倒是好夫妻.....
- 彼: 请听我说! 看电影我们可以明天或者后天去。今天我必须留在家里给我的女信友回信, 因为——请理解——她想来波兰, 我答应帮她打听价格及其他有关注意事项。
- 芭: 现在我明白了。为甚麽你不早点告诉我这些事情?
- 彼: 我想告诉你, 但是你却不让我不开口。

电话交谈

- 姐奴塔: 喂! 是你吗, 芭芭拉?
- 芭芭拉: 是的, 是我。
- 姐: 你好! 我是姐奴塔。
- 芭: 你好, 亲爱的!
- 姐: 听我说芭芭拉, 今天晚上你打算干甚麽?
- 芭: 我打算听收音机和看杂志。
- 姐: 那么你丈夫今天晚上打算干甚麽?
- 芭: 同往常一样, 他准备忙他的世界语。请告诉我, 你问这些干什么?
- 姐: 你能来我这儿一下吗?
- 芭: 今天晚上去你那里吗?
- 姐: 是的, 你知道我购买了一套新的合作住宅。
- 芭: 是的, 我知道。
- 姐: 那么, 正好今天晚上我想领你们去看看我的新居。和你丈夫一起来吧!
- 芭: 我丈夫很忙。
- 姐:晚上也忙吗?
- 芭: 我想是的。
- 姐: 那么别叫你丈夫, 你一个人来吧!
- 芭: 好吧。
- 姐: 那么晚上再见?
- 芭: 好的, 晚上见!

En la nova loĝejo de Danuta

- Barbara: Saluton!
- Danuta: Bonvolu eniri! Ho, jes, vi devas demeti la mantelon!
- B: Dankon! Vi ne estas sola?
- D: Estas ĉe mi miaj geamikoj-- geedzoj Romaniuk. Ili estas tre simpatiaj homoj.
- B: Bonan vesperon!
- Sinjoro R: Bonan vesperon!
- Sinjorino R: Bonan vesperon!
- D: Mia amikino Barbara- gesinjoroj Romaniuk.
- Gesinjoroj R: Tre agrable! Tre agrable!
- B: Estas al mi tre agrable konatiĝi kun vi, gesinjoroj!
- D: Bonvolu sidiĝi, Banjo! Jen estas seĝo por vi. Kion vi trinkos, Banjo, teon aŭ kafon?
- B: Mi trinkos teon.
- D: Kun citrono?
- B: Mi petas fortan teon, sed sen citrono.
- D: Bone. Ĉu vi onkaŭ trinkos teon, Enjo kaj Miĉjo?
- Sinjorino R: Mi petas teon kun citrono.
- Sinjoro R: Kaj mi petas kafon, malgrandan kafon.
- B: Tre agrable estas via loĝejo, Danjo!
- Sinjoro R: Efektive. Ĝi estas bela kaj moderna!
- Sinjorino R: Eĉ kun balkono!
- B: Sed kial tiu ĉi sofolito staras ĉi tie? En mia loĝejo la sofolito staras apud la fenestro.
- D: La loko apud la fenestro estas destinita por skribotablo.
- B: Aĥ, efektive, en la ĉambro ne estas skribotablo.
- D: Ho, en la ĉambro mankas ankoraŭ multaj mebloj. Mi devas aĉeti malgrandan tablon, mi ankaŭ aĉetos novan ŝrankon, ĉar tiu ĉi, kiu nun troviĝas ĉi tie estas tre malnova. Ĝi estas tre malbela kaj ĝi tute ne taŭgas por nova, moderna loĝejo ĝi taŭgas nur por muzeo.

在姐姐塔的新住宅里

- 芭芭拉：你好！
- 姐姐塔：请进来吧！哦，你的把外套脱下来吧！
- 芭：你好！就你一个人在家吗？
- 姐：罗马尼克夫妇在我家。他们是非常具有同情心的人。
- 芭：晚上好！
- 罗先生：晚上好！
- 罗太太：晚上好！
- 姐：这是我的朋友芭芭拉，这是罗马尼克夫妇。
- 罗夫妇：非常高兴！非常高兴！
- 芭：先生太太，认识你们非常高兴！
- 姐：大家请坐，小芭，给你椅子；你想喝点甚麽？是茶还是咖啡？
- 芭：我想喝茶。
- 姐：加柠檬吗？
- 芭：我要一杯浓茶，请不要加柠檬。
- 姐：小艾，小米，你们也喝茶吗？
- 罗先生：我要一杯柠檬茶。
- 罗太太：我要一杯咖啡，一小杯咖啡。
- 芭：小姐，你的新住宅真令人心旷神怡！
- 罗先生：事实上，它既漂亮又符合潮流。
- 罗太太：而且还有阳台！
- 芭：但是为甚麽这个沙发床放在这个地方？在我的房间里沙发床是放在窗户旁边的。
- 姐：在窗户旁边我准备放一个写字台。
- 芭：啊，原来在房间里没有写字台。
- 姐：哦。我房间里还缺少很多家具。我还必须买一个小方桌，还要买一个新柜子，因为放在这里的一个柜子太旧了。也太丑了，而且也与现代化的新住宅不相配，只能扔到博物馆里去了。

-- B: Jes, vi pravas. En tia loĝejo devas esti modernaj mebloj!

Mi havas por vi donacon

- Barbara: Ho, Danjo, mi tute forgesis.
- Danjo: Kion vi forgesis?
- B: Mi tute forgesis, ke mi havas por vi donacon.
- D: Donacon!
- B: Jes.
- D: Mi estas tre scivola. Ĉu ĝi estas ĉeko por granda monsumo?
- B: Ne. Jen mia donaco por la nova loĝejo. Ĝi estas cindrujo.
- D: Cindrujo?
- B: Ĉu tio ĉi estas por vi elreviĝo?
- D: Tute ne! Ĉu vi povas montri al mi ĉi tiun cindrujon? Ho, bela! Tre moderna formo! Mi dankas al vi, Banjo! Vi estas tre simpatia! Banjo, vi estas tre bona amikino!

Ĉu vi havos tempon lunde posttagmeze?

- Danuta: Ĉu vi havas tempon lunde posttagmeze?
- Barbara: Bedaŭrinde lunde posttagmeze mi ne havos tempon, mi estos tre okupita. Sed mi havos tempon marde.
- D: Marde? Bone. Vidu, mi volus renkontiĝi kun vi, ĉar mi volus kune kun vi aĉeti kelkajn objektojn por mia nova loĝejo.
- B: Mi tre volonte renkontiĝos kun vi. Mi tre ŝatas fari aĉetojn.

LA DEKA LECIONO

Kiom da mono vi bezonas?

- Barbara: Mi foriras aĉeti ion por manĝi. Ĉu vi deziras ion de mi?
- Sinjoro Petro: (la edzo de Barbara). Aĉetu por mi skatolon da cigaredoj aŭ eble... aĉetu

- 芭: 是的, 你说得很正确。在这样的房间里应该摆上现代化的家具。

我有礼物送给你

- 芭芭拉: 小姐, 我几乎忘了一件事。
- 姐: 你忘了什么?
- 芭: 我完全忘了, 我给你带礼物来了。
- 姐: 礼物?
- 芭: 是的。
- 姐: 我很想知道, 它是一笔大数额的支票吗?
- 芭: 不是的。瞧, 这是我为你的新居准备的, 是个烟缸。
- 姐: 烟缸?
- 芭: 这个东西使你失望了吗?
- 姐: 完全没有。你能把这个烟缸给我瞧瞧吗? 呵, 漂亮! 非常时髦的式样! 谢谢你, 小芭! 你太可爱了, 你是我最好的朋友!

星期一下午你有时间吗?

- 姐奴塔: 星期一下午你有时间吗?
- 芭芭拉: 很遗憾, 星期一下午我没有时间, 我很忙。但是星期二我有时间。
- 姐: 星期二吗? 很好。那么我想约你陪我去为我的新居买些东西。
- 芭: 我非常愿意陪你去。我很喜欢购物。

第十课

你需要多少钱?

- 芭芭拉: 我出去买点吃的东西, 你需要我带什么东西吗?
- 彼得先生: (芭芭拉的丈夫) 帮我买一包香烟或者二包香烟吧! 还有一包火柴。

por mi du skatolojn da cigaredoj kaj unu skatolon da alumetoj.

- B: Bone. Ĉu vi ankoraŭ deziras ion?

- P: Ne, dankon. Estas ĉio. Ĉu vi havas monon?

- B: Bedaŭrinde mi havas malmulte da mono ĉar hieraŭ mi elspezis la tutan monon por la riparo de nia glaciŝranko.

- P: Kiom vi pagis por la riparo?

- B: Cent zlotoj. Sed mi ankaŭ elspezis iom da mono por ŝtofo.

- P: Por ŝtofo?

- B: Jes. Mi aĉetis tre belan ŝtoton por nova robo. Proksimiĝas somero, kaj do mi devas havi novan robon, ĉar...

- P: ... mi komprenas. Kiom ĝi kostis?

- B: Ĝi kostis ducent kvindek zlotojn.

- P: Kiom da mono vi bezonas nun?

- B: Mi bezonas tricent zlotojn.

- P: Ĉu multe da mono vi devos pagi al via tajlorino?

- B: Ducent zlotojn.

- P: Do, mi pensas, ke sescent zlotoj sufiĉos al vi?

- B: Certe jes. Dankon, mia kara.

- 芭: 好的, 你还需要其它东西吗?

- 彼: 不需要了, 谢谢。就这些。你有钱吗?

- 芭: 对不起, 我的钱不够。因为昨天我修冰箱把钱花光了。

- 彼: 修冰箱花了多少钱?

- 芭: 100兹罗托。而且我买衣料还花了一些钱。

- 彼: 买衣料?

- 芭: 是的, 我买了一点漂亮的衣料想做条裙子。夏天快来了, 我得有条新裙子, 因为

- 彼: 我知道了, 它需要多少钱?

- 芭: 它需要250兹罗托。

- 彼: 你现在需要多少钱?

- 芭: 我需要300兹罗托。

- 彼: 做衣服你需要花多少钱?

- 芭: 200兹罗托。

- 彼: 那么, 我想, 给你600兹罗托, 够了吗?

- 芭: 肯定够了。谢谢你, 亲爱的。

En vendejo

- Barbara: Bonan tagon!

- Vendisto: Bonan tagon, sinjorino! Per kio mi povas servi al vi?

- B: Mi deziras unu kilogramon da salo, du kilogramojn da sukero, tri kilogramojn da faruno.

- V: Jes, sinjorino. Jen la salo, la sukero kaj la faruno. Ĉu vi ankaŭ deziras panon?

- B: Jes. mi petas unu panbulon kaj kvar... kaj kvin bulkojn.

- V: Ĵus ni ricevis freŝan fromaĝon...

- B: Ho, tre bone. Mi petas dek dekagramojn da fromaĝo. Bonvolu doni al mi ankaŭ dek kvin dekagramojn da ŝinko. Ĉu vi havas oranĝojn?

- V: Bedaŭrinde nunmomente ni ne havas oranĝojn, sed eble vi deziras citronojn aŭ

在百货商店

- 芭芭拉: 你好!

- 售货员: 你好, 太太! 你想要点什么?

- 芭: 我想要一公斤盐, 二公斤糖, 三公斤面粉。

- 售: 好的, 太太。这是盐, 这是糖和面粉。你还要面包吗?

- 芭: 是的。我要一个大面包和四个或者五个小面包。

- 售: 我们刚到了新鲜的奶酪... ..

- 芭: 哦, 太好了。我要100克奶酪, 另外再给我150克火腿。你们有橙子吗?

- 售: 对不起, 现在我们没有橙子, 你想要点柠檬或者香蕉吗?

bananojn?

- B: Ne, mi dankas. Tamen eble... jes, bonvolu pesi por mi unu citronon!

- V: Jes, sinjorino!

- B: Kiom ĝi pezas?

- V: Ĝi pezas ses dekagramojn.

- B: Eble mi tamen prenos du citronojn?

- V: Bonvolu!

- B: Kiom pezas tiuj ĉi du citronoj?

- V: Ili pezas dek ses dekagramojn. Ĉu ankoraŭ per io mi povas servi al vi?

- B: Dankon, estas ĉio! Kiom mi pagas por la citronoj?

- V: Por la citronoj vi pagas kvin zlotojn. Kaj por ĉio vi pagas naŭdek unu zlotojn. kaj kvindek groŝojn.

- 芭: 谢谢, 我不要。要不..... 好吧, 请给我称一个柠檬吧!

- 售: 好的, 太太!

- 芭: 有多重?

- 售: 有60克重。

- 芭: 那就给我称二个好吗?

- 售: 没问题!

- 芭: 这二个柠檬有多重?

- 售: 它们共重160克。你还需要点什么吗?

- 芭: 谢谢, 够了! 柠檬要多少钱?

- 售: 柠檬要5兹罗托, 总共需要91兹罗托50格罗修。

LA DEKUNUA LECIONO

Kion vi farus, se mi ne venus!

Barbara renkontiĝas en kafejo kun sinjoro Marko

- Barbara: Bonan tagon!

- Sinjoro Marko: Bonan tagon, sinjorino! Bonvolu sidiĝi! Mi tre ĝojas, ke vi venis.

- B: Kion vi farus, se mi ne venus?

- M: Mi ne scias, sed...mi nur scias, ke mi estus tre malgaja.

- B: Ĉu vere?

- M: Jes, vere. Sinjorino Barbara, kion vi trinkos?

- B: Mi deziras laktan koktelon.

- M: Mi devas konfesi al vi, ke vi tre plaĉas al mi...

- B: Mi ankaŭ deziras malgrandan fromaĝkukon.

- M: De nia lasta renkontiĝo mi ĉiam pensas pri vi...

- B: Vi ankaŭ povas mendi botelon da minerala akvo.

- M: Mi pensas pri vi! Ĉu vi komprenas?

- B: Jes, mi komprenas. Do mi plaĉas al vi?

第十一课

要是我不来, 你怎么办呢?

芭芭拉在咖啡馆与马尔科约会

- 芭芭拉: 你好!

- 马尔科先生: 你好, 太太! 请坐! 我非常高兴, 你终于来了。

- 芭: 要是我不来, 你准备怎么办?

- 马: 我不知道, 但是..... 我只知道我将会很悲伤。

- 芭: 是真的吗?

- 马: 是真的。芭芭拉太太, 你喝点什么?

- 芭: 我想要一杯乳汁鸡尾酒。

- 马: 我必须向你坦白, 我非常喜欢你.....

- 芭: 我还想要一小块奶酪点心。

- 马: 自上次约会后, 我总在想你.....

- 芭: 我还想要一瓶矿泉水。

- 马: 我想你! 你明白吗?

- 芭: 是的, 我明白。你喜欢我, 是吗?

- M: Jes, sinjorino.
- B: Do vi ĉiam pensas pri mi?
- M: Jes, sinjorino, ĉiam.
- B: Kaj vi farus por mi ĉion?
- M: Kompreneble!
- B: Bonvolu do mendi por mi laktan koktelon, malgrandan fromaĝkukon kaj botelon da minerala akvo!
- M: Ho, sinjorino... mi petas pardonon! Mi tuj mendos ĉion.

Mi intencas forveturi al Stegna

- Marko: Kien vi intencas forveturi por via libertempo?
- Barbara: Mi intencas forveturi al Stegna.
- M: Kien?
- B: Al Stegna Ĝi estas malgranda, trankvila loko proksime al Gdansko. Mi ne ŝatas libertempi tie, kie estas multe da homoj, kaj ĝuste en Stegna estas malmulte da homoj.
- M: En kiu monato vi forveturos tien?
- B: Verŝajne en aŭgusto. Mi ŝatas libertempi aŭguste. Ĉu vi ankaŭ libertempos en aŭgusto?
- M: Mi ankoraŭ ne scias. Se mi povus, mi dezirus libertempi en aŭgusto aŭ en septembro, sed tio ĉi ne estas ebla.
- B: Kial?
- M: En aŭgusto kaj septembro estas multe da laboro en nia entrepreno. Se mi ricevos libertempon en oktobro aŭ novembro, mi estos kontenta, kvankam mi ne ŝatas libertempi aŭtune.
- B: Kaj kion vi faros, se vi ricevos libertempon en decembro, januaro aŭ februaro?
- M: Tiam mi forveturos al Zakopane. Vintre estas tie tre bele, tre agrable.
- B: Jes. certe. Se temas pri mi, mi ŝatas libertempi nur printempe kaj somere. Mi tre volonte libertempas en marto, aprilo, majo, junio, julio kaj aŭgusto.
- M: Mi pensas, ke tre agrable estas libertempi

- 马: 是的, 太太。
- 芭: 你总在想我, 是吗?
- 马: 是的, 太太, 我总在想你。
- 芭: 那么你能为我做一切吗?
- 马: 当然可以!
- 芭: 那就请给我要一杯乳汁鸡尾酒, 一块奶酪点心和一瓶矿泉水吧!
- 马: 哦, 太太..... 请原谅! 我马上去给你要。

我打算到斯特格拉去旅行

- 马尔科: 你打算到什么地方去度假?
- 芭芭拉: 我打算到斯特格拉去旅行。
- 马: 什么地方?
- 芭: 去斯特格拉。它是格丹斯科附近一个很小又很安静的地方。我不喜欢到人多的地方去度假, 恰好在斯特格拉没有那么多的人。
- 马: 几月份你去那个地方?
- 芭: 好象是八月份。我喜欢在八月份度假。八月份你也度假吗?
- 马: 我还不知道。如果可能, 我很愿意在八月或九月度假, 但这是不可能的。
- 芭: 为什么?
- 马: 八月份和九月份我们单位有很多工作。要是在十月或十一月份我能得到休假, 我就很满足了; 尽管我不喜欢在秋天度假。
- 芭: 要是在十二月, 元月或二月份你得到休假, 你怎么办?
- 马: 那时我就去扎科帕那旅行。冬天那里非常美丽, 非常愉快。
- 芭: 是的, 说的不错。但对于我来说, 我只喜欢在春天或夏天度假。我非常愿意在三月、四月、五月、六月、七月或八月份度假。
- 马: 我想最愉快的事情应该是在国外去度

eksterlande.

- B: Certe jes. Se mi havus multe da mono, mi forveturus eksterlanden...eble al Prago, eble al Budapeŝto...

- M: Al Budapeŝto? Ho, mi ĵus ricevis leteron de mia korespondantino Eva Kovacs. En la letero ŝi informas min, ke baldaŭ ŝi venos al Varsovio. Ŝi estas tre simpatia korespondantino, tre ĉarma junulino.

- B: Ho, jes? Tre bone!Certe vi estas tre kontenta, ke ŝi venos al Varsovio. Vi povos renkontiĝi kun ŝi, kiam ŝi venos,vi povos konfesi al ŝi, ke ŝi plaĉas al vi, vi povos konfesi, ke vi pensas pri ŝi...

- M: Sinjorino Barbara!Sed koncerne la hungarinson... mi ne scias, ĉu via edzo ne estos kolera, ke mi korespondas kun ŝi?

- B: Sinjoro, ne zorgu pri mia edzo! Prefere zorgu pri la hungarino! Ĝis antaŭ ne longe ŝi krespondis nur kun polo-edzo kaj nun ŝi ankaŭ korespondas kun polo-fraŭlo.Tio ĉi variigas ŝiajn kontaktojn kun Pollando.

- M: Mi komprenas. Do vi estas ĵaluza pri via edzo?

- B: Tute ne.

- M: Tamen almenaŭ iomete!

- B: Ne kolera, sinjoro,sed mi jam devas adiaŭi vin. Mi ne havas multe da tempo, ĉar hejme mi havas multe da laboro.

- M: Jam nun vi devas iri hejmen?

- B: Jes, sinjoro. Ĝis revido!

- M: Ĝis revido. Sinjorino Bar...

假。

- 芭：那是肯定的。如果我有钱，我将到国外去旅行... . . .可能去布拉格，也可能去布达佩斯... . . .

- 马：去布达佩斯？哦，我刚收到我的女信友爱娃·科瓦奇的一封信。她在信中告诉我，不久她就要到华沙来。她是个非常富于同情心又特别迷人的少女。

- 芭：哦，是吗？那太好了！你肯定会很满意，她将会到华沙来。你可以与她约会，当她到华沙时，你可以向她表白，你喜欢她，你在思念她.....

-马：芭芭拉太太！但是涉及到匈牙利女人.....我不知道你的丈夫是不是会因为我和她通信而生气？

- 芭：先生，别管我的丈夫！好好关照那个匈牙利女人吧！前不久她仅仅与一个波兰有妇之夫通信，而现在她又与一个波兰小伙子通信。这改变了她与波兰的接触。

- 马：我明白了。你这不是在吃你丈夫的醋吗？

- 芭：完全不是。

- 马：然而至少有一点！

- 芭：先生请别生气，我已经该向你告别了。我没有太多的时间，因为家中还有很多事情要做。

- 马：你确实必须回家了吗？

- 芭：是的，先生。再见！

- 马：再见，芭太太... . . .

LA DEKDUA LECIONO

Ĉu vi longe atendas min?

- Danuta: Saluton, Banjo!

- Barbera: Saluton!

- D: Ĉu vi longe atendis min?

- B: Tute ne, Mi ĵus venis ĉi tien.

- D: Mi esperas, ke nun vi estas libera?

- B: Mi estas tute libera,do ni povas iri ĉien,

第十二课

你等了我很久吗？

- 姐奴塔：你好，小芭！

- 芭芭拉：你好！

- 姐：你等了我很久吗？

- 芭：完全没有，我刚到这里。

- 姐：我想你现在有空吗？

- 芭：完全有空，我们可以到所有一切你想去

kien vi deziras.

- D: Bone. Mi proponas do, ke unue ni iru al magazenoj fari aĉetojn kaj poste ni iru al kafejo trinki kafon kaj manĝi bongustan glaciaĵon.

- B: Tre bone, sed mi deziras, ke ni ankaŭ elektu kaj aĉetu donacon por mia edzo. Vidu, morgaŭ estas lia naskiĝtago.

- D: Jes, ĝuste. Mi tute forgesis, ke morgaŭ estas la naskiĝtago de Petro.

Kiel plaĉas al vi tiu ĉi servico

- Danuta: Kiel plaĉas al vi tiu ĉi servico?

- Barbara: Ĝi estas tre bela.

- D: Ĉu vere? Ĉu mi aĉetu ĝin?

- B: Nepre!

- D: Bone. Kaj kiel plaĉas al vi tiu ĉi tekruĉo?

- B: Nu, por esti sincera, mi devas konfesi al vi, ke ĝi ne tre plaĉas al mi. Sed rigardu tiun, sur la breto! Laŭ mia gusto ĝi estas pli bela, kvankam malpli granda.

- D: Jes, vi pravas, Ĝi estas la plej bela el inter la tekruĉoj, kiuj troviĝas ĉi tie. Ĉu mi prenu ĝin?

- B: Jes, nepre! Do, nun mi proponas, ke vi iru kun mi al alia magazeno aĉeti donacon por mia edzo.

- D: Bone, sed ĉu vi jam decidis, kion vi aĉetos por li?

- B: Ankoraŭ ne, sed mi kalkulas je via helpo.

- D: Kompreneble! Mi tre volonte helpos al vi. Do, kien ni iru? Ho, mi sugestas, ke ni iru al ĉiovendejo! Tie estas tre belaj kravatoj kaj manumbutonoj.

- B: Multekostaj?

- D: Ne tre. Antaŭ unu semajno aŭ antaŭ du semajnoj mi aĉetis tie por mia avo tre plaĉan kravaton.

- B: Kiom vi pagis por ĝi?

- D: Mi precize ne rememoras, sed ŝajnas al mi, ke ĉirkaŭ 100 zlotojn.

的地方。

- 姐: 很好。我建议, 首先我们到杂货铺去买点东西, 然后我们去咖啡馆喝咖啡吃可口的冰淇淋。

- 芭: 太好了, 但是我还想为我丈夫挑点礼物。瞧, 明天就是他的生日。

- 姐: 可以, 那正好。我完全忘了, 明天就是彼得的生日。

你认为这套餐具怎么样

- 姐奴塔: 你认为这套餐具怎么样?

- 芭芭拉: 它非常漂亮。

- 姐: 是真的吗? 我可以买吗?

- 芭: 那当然!

- 姐: 那好。你认为这个茶壶怎么样?

- 芭: 唔, 说心里话, 我不太喜欢。可是你看货架上的那一个! 按我的爱好来说, 它是这些茶壶中最漂亮的一个, 尽管稍微小一点。

- 姐: 是的, 你说得很对。它是这些茶壶中最漂亮的一个。我可以买吗?

- 芭: 当然! 那么现在我建议你陪我到其他商店去为我丈夫买点礼物。

- 姐: 好的, 然而你已经决定为他买什么东西了吗?

- 芭: 还没有, 我可是还指望你给我参谋一下的呢。

- 姐: 那没问题! 我非常愿意帮你参谋。那我们去哪儿? 呵, 我建议去百货商店! 那儿有特别漂亮的领带和领带夹。

- 芭: 很贵吗?

- 姐: 不太贵。一星期还是二星期前我为我祖父买了了一条他非常喜欢的领带。

- 芭: 花了多少钱?

- 姐: 我记得不太清楚, 好象是100兹罗托左右。

Ĉu la griza kravato estos praktika?

- Danuta: Ho, rigardu! Estos facile elekti. Tiom da diverskoloraj kravatoj - verdaj, brunaj, flavaj...
- Barbara: ... sed ne estas grizaj.
- D: Ho, bone rigardu, estas ankaŭ grizaj.
- B: Jes, efektive, vi pravas. Kiel plaĉas al vi tiu ĉi koloro?
- D: Blua? Vi volus preni ĉi tiun bluan kravaton? Laŭ mia gusto ĝi estas la malplej bela el inter la kravatoj, kiuj troviĝas ĉi tie. Ĉu tamen ne estus pli bone aĉeti la grizan?
- B: Vi pravas. Tiu ĉi griza kravato estas pli bela ol la blua. Mi plej bone faros, se mi aĉetos la grizan. Mi nur ne scias, ĉu la griza kravato estos praktika?
- D: Vi pensas pri la koloro...
- B: Jes, ĝuste.
- D: Nu, la griza koloro ne estas praktika, sed tamen mi devas konfesi al vi, ke tiu ĉi griza kravato tre plaĉas al mi, ĝi estas tre bela.

灰领带适用吗?

- 姐奴塔: 嘿, 快瞧! 这么多五颜六色的领带—绿色的, 棕色的, 黄色的... ..
- 芭芭拉:但是没有灰色的。
- 姐: 嘿, 快看, 那儿不是也有灰色的吗。
- 芭: 是的, 你说得很对。你认为这种颜色怎么样?
- 姐: 蓝色的吗? 你想买这个蓝色的领带吗? 我认为它是所有这些领带中最难看的的一条。倒还不如买那条灰色的, 对吗?
- 芭: 你说得对。这条灰色的领带比那条蓝色的好看。我知道最好是买那条灰色的。但我不知道, 那条灰色的领带是否适用?
- 姐: 你是在考虑那个颜色.....
- 芭: 是的, 正是。
- 姐: 唔, 灰色的颜色是不太适用, 但是我认为那条灰色的领带非常漂亮, 我非常喜欢。

LA DEKTRIA LECIONO

Mi preferas bonan glaciaĵon

- Barbara kaj Danuta faris aĉetojn kaj nun ili estas en kafejo kaj interparolas.
- Danuta: Kion vi trinkos, Banjo?
- Barbara: Mi ankoraŭ ne scias. Sed mi tre soifas kaj ankaŭ malsatas.
- D: Mi ankaŭ devas ion manĝi. Sed ĉi tie en la menuo ne estas manĝaĵoj... sed tamen... Jes...estas sandviĉoj.
- B: Bone. Ni prenu kelkajn sandviĉojn kaj ion por trinki. Kiun trinkaĵon ni mendos?
- D: Eble ni mendu kafon?
- B: Bone. Kaj poste ni prenu du porciojn da kremaĵo.
- D: Ho, se temas pri mi, mi ne ŝatas kremaĵon, mi preferas bonan glaciaĵon.

第十三课

我喜欢可口的冰淇淋

- 芭芭拉和姐奴塔买完东西后, 进了一家咖啡店并且在交谈。
- 姐奴塔: 小芭, 你喝点什么?
- 芭芭拉: 我还不知道, 但是我感到很渴, 而且还有点饿。
- 姐: 我也想吃点东西。但是在这个地方的菜单上没有吃的东西.....可是.....对了, 有三明治。
- 芭: 好吧。我们可以吃点三明治再喝点什么。你想喝什么饮料?
- 姐: 喝咖啡怎么样?
- 芭: 可以。然后我们要二份奶酪。
- 姐: 嚯, 对于我来说, 我不喜欢奶酪, 我喜欢可口的冰淇淋。

- B: Nu, bone, tiel estu, kiel vi deziras. Se temas pri mi, mi ŝatas ĉiajn dolĉaĵojn.
- D: Ho, Jen venas kelnerino.
- Kelnerino: Bonan tagon! Per kio mi povas servi al vi sinjorinoj?
- B: Bonan tagon! Ni deziras ses sandviĉojn, du grandajn kafojn, unu kremaĵon kaj unu porcion da glaciaĵo.
- D: Vi ankaŭ povas alporti botelon da minerala akvo.
- Kelnerino: Ĉu estas ĉio?
- B: Jes, estas ĉio.

Kozara estas lia pseŭdonimo

- Barbara: Mi tralegis tiun ĉi libron kiun vi pruntedonis al mi kaj mi estas rekte ravita.
- Danuta: Mi ĝojas, ĉar ankaŭ al mi ĝi tre plaĉas.
- B: Jes, ĝi estas tre bona libro. Mi admiras la talenton de Tadeo Kozera. Tiu ĉi verkisto estas vera virtuozo de la vorto.
- D: Mi konsentas kun vi pri tio.
- B: Ĉu eble vi havas aliajn liajn librojn? Mi volonte prunteprenus ilin de vi.
- D: Bedaŭrinde mi ne havas, sed baldaŭ aperos liaj noveloj. Kozera kunlaboras kun nia eldonejo. Ĉi-jare aperos ĉe ni du liaj libroj. Mi supozas, ke la "noveletoj" aperos ankoraŭ ĉimonate, kaj la alia libro, kiun mi ĝuste redaktas, aperos ĉe la fino de la jaro.
- B: Do kiel redaktorino de lia libro vi ofte intervidiĝas kun li?
- D: Jes, li ofte venas al nia redakcio pridiskuti miajn rimarkojn antaŭ ol ni transdonos lian tajpaĵon al presejo.
- B: Mi devas konfesi, ke sub la impreso de lia libro mi skribis al li leteron. Mi deziris sendi ĝin perpoŝte, sed mi ne trovis lian adreson. En la telefonlibro ne estas lia nomo.
- D: Vi povas doni al mi ĉi tiun leteron kaj mi transdonos ĝin al Kozera. Vi ne trovis lian nomon en la telefonlibro, ĉar li verkas sub pseŭdonimo. Tadeo Kozera estas lia

- 芭: 好, 就这样吧, 按你说的。对我来说, 所有甜食我都喜欢。
- 姐: 哦, 瞧, 服务员来啦。
- 服务员: 你们好! 女士们, 你们需要什么?
- 芭: 你好! 我们要六个三明治, 二杯咖啡和一份奶酪、一份冰淇淋。
- 姐: 再拿一瓶矿泉水。
- 服务员: 就这些吗?
- 芭: 是的, 就这些。

科泽拉是他的笔名

- 芭芭拉: 我看完了你借给我的这本书, 我简直被这本书给迷住了。
- 姐奴塔: : 我很高兴, 因为我也很喜欢这本书。
- 芭: 是的, 它是一本很好的书。我很欣赏达得沃·科泽拉的才干。这位作家是个名符其实的语言大师。
- 姐: 我同意你对这个问题的看法。
- 芭: 你有他的另外一些书吗? 我想从你那里借来看看。
- 姐: 很遗憾, 我没有, 但是马上就要出版他的短篇小说集了。科泽拉和我们出版社在合作。今年我们将出版他的二本书。我估计他的“小说集”这个月就会出版, 我正在编辑的另一本书, 将在今年年底出版。
- 芭: 那么作为他的书籍的编辑, 你经常和他见面吗?
- 姐: 是的, 在我们把他的稿子交给印刷社之前, 他经常来我们编辑部讨论我的观点。
- 芭: 我必须承认, 受他书籍的影响, 我给他写了一封信。我想通过邮局寄给他, 但不知道他的地址。在电话通信簿中没有他的名字。
- 姐: 你可以把这封信交给我, 我再转交给科泽拉。你之所以在电话通信簿中找不到他的名字, 是因为他是用笔名进行写作的。达得沃·科泽拉是他的笔名。

pseŭdonimo.

- B: Ĉu vere? Kiel do li nomiĝas?

- D: Mi ne povas malkaŝi. Tio ĉi estas ofica sekreto.

- B: Vi jam preskaŭ malkaŝis ĉi tiun sekreton. Se vi jam diris pri la pseŭdonimo, vi povas malkaŝi lian veran nomon. Diru!

- D: Vere, mi ne povas.

- B: Do almenaŭ diru, kiel li aspektas kaj kia li estas?

- D: Tre simpatia. Karakterizas lin simpleco, granda modesteco, sed samtempe la homo, kiu interparolas kun li tuj vidas, ke li estas vere eksterordinara. Karakterizas lin ankaŭ grandĝentileco, afableco kaj eleganteco.

- B: Jes?

- D: Li estas tre eleganta, sufiĉe belaspekta, belstatura kaj... hmm... tre sentimentala.

- B: Kiom li aĝas?

- D: Li estas 30--32-jara.

- B: Ĉu li estas fraŭlo?

- D: Jes, sed mi vidas, ke vi interesiĝas ne nur pri liaj libroj...

- B: Ho, mia kara, vi malĝuste komprenis min... Kiam mi legas libron, kiu tute aparte plaĉas al mi, mi ankaŭ deziras scii ion pri ĝia aŭtoro.

- 芭: 是真的吗? 那么他真名叫什么?

- 姐: 我不能够披露。这是公务机密。

- 芭: 你已经快把这个机密披露了。你既然已经说出了他的笔名, 你就可以披露他的真名。快说!

- 姐: 真的, 我不能说。

- 芭: 那么至少要告诉我, 他长得什么模样? 是个什么样的人?

- 姐: 非常有同情心。他具有单纯、非常谦虚的性格, 同时当人们和他谈话时就会发现, 他是个真正不平凡的人。他还具有非常有礼貌、和蔼和优雅的性格。

- 芭: 是吗?

- 姐: 他非常优雅、外表漂亮、身材美丽, 而且... 呢... 非常多情。

- 芭: 他有多大年纪?

- 姐: 他30到32岁。

- 芭: 他是个小伙子吗?

- 姐: 是的。可是我发现, 你不仅仅是在关心他的书了... ..

- 芭: 哦, 我亲爱的, 你错误地理解我了... ..当我读到我特别喜欢的书时, 我也非常想了解作者的一些情况。

LA DEKKVARA LECIONO

Mi havas por vi surprizon

- Barbara: Bonan matenon !

- Petro: Bonan matenon! mia kara!

- B: Mi havas por vi surprizon.

- P: Vi ĉiam havas por mi surprizojn.

- B: Sed hodiaŭ mi parolas tre serioze. "Okaze de via naskiĝtago akceptu miajn plej korajn bondezirojn!"

- P: Mi kore dankas pro la memoro kaj pro la belaj bondeziroj.

- B: ... kaj jen mia donaco por vi.

第十四课

我要给你一个惊喜

- 芭芭拉: 早上好!

- 彼得: 早上好, 我亲爱的!

- 芭: 我要给你一个惊喜。

- 彼: 你总是有惊喜给我。

- 芭: 但是今天我是认真的。“在你生日之际, 请接受我最衷心的祝愿!”

- 彼: 我真心谢谢你记得我的生日和良好的祝愿。

- 芭: ... 瞧, 这是我送给你的礼物。

- P: Ho!
 - B: Kiel plaĉas al vi la kravato?
 - P: Bela, tre bela. Mi dankas al vi pro tiu ĉi bela donaco. Vi estas tre kara, Banjo!-
 Pardonu. Banjo, kioma horo?
 - B: Estas precize la 6-a.(sesa)
 - P: Jam estas la 6-a? Ho,mi jam devas iri al mia laborejo.
 - B: Ankoraŭ estas frue.
 - P: Sed, mia kara, komprenu, hodiaŭ mi devas esti en mia laborejo pli frue ol kutime.
 - B: Jes, jes. Do ni rapide matenmanĝu!
 - P: Kioma horo nun estas?
 - B: 5 (kvin) minutoj post la 6-a.
 - P: Ĉu tiu ĉi horloĝo bone funkcias? Ĉu gi ne malfruas?
 - B: Tute ne. Ĝi eĉ iomete rapidas.
 - P: Do bone.
 - B: Ĉu hodiaŭ vi tagmanĝos en via laboreja tagmanĝejo?
 - P: Se tio ĉi estus ebla, mi preferus manĝi hejme.
 - B: Mi preparos bongustan tagmanĝon, sed mi devas anticipi scii, je kioma horo vi revenos hejmen post la laboro.
 - P: Je la 14-a (dek-kvara).
 - B: Bone. Je la 14-a kaj duono vi jam povos tagmangi.
 - P: Nun mi devas tre rapide razi min, lavi min, mi devas vesti min, mi devas kombi min kaj poste mi povos matenmanĝi. Banjo?
 - B: Jes?
 - P: Ĉu la matenmanĝo jam estas preta?
 - B: Preskaŭ, sed, ĉu vi jam razis vin, lavis vin, kombis vin kaj vestis vin?
 - P: Jes, mia kara. Kioma horo?
 - B: Nun estas kvarono post la 6-a.
 - P: Do ni matenmanĝu!
 - B: Bonan apetiton!

Ĉu mi povas bondeziri al Petro?

- Danuta: Halo, Banjo?
 - Barbara: Jes, mi aŭskultas.
 - D: Parolas Danuta. Ĉu mi povas bondeziri al

- 彼：哦！
 - 芭：你喜欢这条领带吗？
 - 彼：漂亮，非常漂亮。谢谢你送给我这么漂亮的礼物。你太可爱了，小芭！对不起，小芭，几点钟了？
 - 芭：已经六点整了。
 - 彼：已经六点了吗？啊，我该去上班了。
 - 芭：还早呢。
 - 彼：但是，我亲爱的，请理解，今天我必须去得比往常早一点。
 - 芭：对的，对的。那么我们快吃早饭吧！
 - 彼：现在几点了？
 - 芭：六点过五分钟了。
 - 彼：这个闹钟走得准吗？它慢不慢？
 - 芭：一点不慢。它甚至有点快。
 - 彼：那太好了。
 - 芭：你今天在你们单位食堂吃午饭吗？
 - 彼：如果可能，我宁愿回家吃。
 - 芭：我给你准备可口的午饭，但我必须预先知道，你几点下班回家。
 - 彼：14点下班。
 - 芭：那好，14点半你就可以吃午饭了。
 - 彼：现在我必须赶快刮胡子，洗脸，穿衣服，梳头然后吃早饭。小芭？
 - 芭：干什么？
 - 彼：早饭已经准备好了吗？
 - 芭：差不多了，可是你已经刮完胡子，洗完脸，梳完头，穿好衣服了吗？
 - 彼：是的，亲爱的。几点啦？
 - 芭：现在是六点过一刻。
 - 彼：那么我们吃早饭吧！
 - 芭：祝你胃口好！

我可以向彼得表示祝福吗？

- 姐奴塔：喂，是小芭吗？
 - 芭芭拉：是我，我在听你说话。
 - 姐：我是姐奴塔。我可以向彼得表示祝福

Petro? Ĉu vi povas peti lin al la telefonaparato?

- B: Li forestas. Li jam foriris.

- D: Ĉu vere? Hmm... domaĝe.

- B: Li tre frue razis sin lavis sin, kombis sin, vestis sin. Poste li rapide matenmanĝis kaj duonon post la 6-a li foriris al sia laborejo.

- D: Ĉu plaĉis al li la kravato?

- B: Ĝi tre plaĉis al li.

- D: Je kioma horo li revenos hejmen?

- B: Pli-malpli kvaronon post la 14-a. Ho, mi devas informi vin, ke ni decidis ne fari la naskiĝtagan festenon hejme. Mia edzo invitas vin kaj kelkajn geamikojn al teatro. Post la spektaklo ni iros al iu lokalo vespermanĝi kaj iom danci, iom babili.

- D: Mi kore dankas pro la invito. Sed, ĉu mi venu al via hejmo antaŭ ol iri al teatro?

- B: Kompreneble, se vi nur povos. Venu je la 18-a (dek-oka). Poste, 10-15 (dek - dek kvin) minutojn post la 18-a, ni kune veturos al teatro. kie ni renkontiĝos kun aliaj geamikoj.

- D: Bone.

- B: Estu akurata, Danjo! Ne malfruiĝu!

- D: Mi ne mulfruiĝos. Certe mi estos akurata. Mi venos 5--10 (kvin - dek) minutojn antaŭ la 18-a aŭ plej malfrue precize je la 18-a.

- B: Tre bone. Aha, ankoraŭ unu afero. Danjo, ĉu vi transdonis mian leteron al Tadeo Kozera?

- D: Bedaŭrinde ankoraŭ ne, ĉar mi ankoraŭ ne intervidiĝis kun li, sed estu certa, ke mi faros ĉi tion.

- B: Do ĝis la revido!

- D: Ĝis la!

吗? 我可以请彼得到电话跟前来吗?

- 芭: 他不在家, 他已经走了。

- 姐: 是真的吗? 啊... 太可惜了。

- 芭: 他一大早就刮胡子, 洗脸, 梳头, 穿好衣服。然后很快吃完早饭六点半就上班去了。

- 姐: 他喜欢那条领带吗?

- 芭: 他非常喜欢。

- 姐: 他几点回家?

- 芭: 14点一刻左右。啊, 我应该通知你, 我们决定不在家里举办生日宴会。我丈夫邀请你和几个朋友去看戏。看完戏后我们去一个地方吃晚饭, 然后我们跳一下舞, 聊一下天。

- 姐: 我衷心感谢你们的邀请。但是我是在看戏之前到你家里去吗?

- 芭: 那当然, 可能的话, 你18点来。然后18点过10到15分我们一起去戏院, 在那里与另几个朋友会面。

- 姐: 好吧。

- 芭: 小姐, 请准时来! 请不要迟到!

- 姐: 我不会迟到的。肯定会准时来。我18点差5--10 分或者最迟18点整来。

- 芭: 太好了。啊, 还有一件事。小姐, 你已经把我的信转交给达得沃·科泽拉了吗?

- 姐: 很遗憾还没有, 因为我还没有与他见面。不过请相信我一定会办好这件事的。

- 芭: 那么再见了!

- 姐: 再见!

LA DEKKVINA LECIONO

Ne ŝereu pri mi

- Danuta: Bonan tagon!

- Barbora: Saluton!

- D: Ĉu vi jam preparis vin?

第十五课

请别拿我开心了

- 姐奴塔: 你好!

- 芭芭拉: 你好!

- 姐: 你已经打扮好了吗?

- B: Ankoraŭ ne, sed post momento mi estos preta.
- D: Kaj kie estas la jubileulo?
- B: En la banĉambro. Li ĝuste nodas sian novan kravaton. Eble atendu nin iomete en la manĝoĉambro. Dume mi iros al la dormoĉambro, kie mi lasis mian ŝalon.
- D: Jes, bone. Ho, ho, ho! Kiam vi aĉetis por vi tiun ĉi robon?
- B: Ĉu ĝi plaĉas al vi?
- D: Tre.
- B: Nenio eksterordinara.
- D: Tamen ĝi estas tre bela! Kiom vi pagis por ĝi?
- B: Mi neniom pagis por ĝi. Mi ricevis ĝin donace.
- D: Donace de la edzo, ĉu?
- B: Imagu, ke ne! Mi ricevis ĝin donace de mia paĉjo.
- D: En Varsovio mi nenie vidis similan robon.
- B: Mia paĉjo aĉetis ĝin hazarde en iu konsignejo en Krakovo.
- D: Vere, ĝis nun mi neniam vidis tiel belan modelon de koktelrobo.
- B: Ne troigu, Danjo! Ĉu vi ne opinias, ke ĝi estas tro loza?
- D: Eble iomete. Sed ne! Tute ne! Sajnas al mi, ke ĝi devus esti iomete loza. Kun via statur...
- B: Ĉesu paroli pri tio! Vi ja scias, ke mi havas komplekson pri mia statur.
- D: Bone, bone! Hmm... Ĉu vi permesos iam almezuri ĉi tiun koktelrobon?
- B: Kompreneble! Vi povos almezuri ĝin, vi povos surmeti ĝin. Mi eĉ povos pruntedoni ĝin al vi, se vi deziras.
- D: Ho ne, dankon! Mi volus iam nur almezuri ĝin. Mi neniam prunteprenas vestojn.
- B: Vi ĉiam troigas aŭ pozas...
- D:... kedu! Eble pro tio, ke mi ne ŝatas pruntepreni ies vestojn, mi neniam vizitas brokantejon.
- B: Kaj mi tute kontraŭe! Mi tre ofte vizitas
- 芭: 还没有, 不过等一会儿我就打扮好了。
- 姐: 然而我们的寿星在哪儿?
- 芭: 在洗澡间。他正在整理他的新领带。请在餐厅等我们一会儿。我去卧室取披巾。
- 姐: 是, 好吧。哈, 哈, 哈! 你什么时候买了这条裙子?
- 芭: 你喜欢它吗?
- 姐: 非常喜欢。
- 芭: 没有什么特别的地方。
- 姐: 然而它确实很漂亮! 你花多少钱买了它?
- 芭: 我没花钱。它是我收的礼品。
- 姐: 是丈夫送的礼品吗?
- 芭: 你想不到不是的吧! 是我父亲送给我的礼品。
- 姐: 在华沙我哪儿也没有见过这样的裙子。
- 芭: 我父亲偶然在克拉科沃的一个展销会上买了它。
- 姐: 真的, 直到现在为止, 我从未见过如此漂亮燕尾裙的样子。
- 芭: 小芭, 别太过分了! 你不觉得它有点太大了吗?
- 姐: 稍微有一点。不, 完全不大! 。我认为和你的身材相比, 它是稍微大了一点。
- 芭: 请别说了! 你明明知道, 我的身材有点变态。
